

# Novajoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

## TIEL OKAZIS

### “AFRIKO” PREZENTITA AL LA URBANOJ

\*la 10-a de februaro, 11h00-12h00, en ĉambro de la domo de JICA.

Okaze de la prelegserio de “Internacia Forumo de Jokohamo”, en kiu nia rondo ankaŭ rolas, ni havis ŝancon prelegi pri “Esperanto en Afriko” de s-ino Doi Ĉieko. En la forumo, estis multaj prelegoj, sed ĉar ĉi-jare oni en Jokohamo havos internacian konferencon pri Afriko, la kontinento fariĝis unu el la ĉefaj temoj. En nia prelego, la duono estis ĝenerala prezento pri Esperanto, kaj la postan duonon ŝi uzis pri afrika esperanto-movado. Multon el la materialo liveris al ŝi Mirejo (s-ino Mireille Grosjean) okaze de ŝia vizito en Jokohamon lastajare.

### HAMA-RONDA VESPERO

\*la 16-a de februaro, 17h00-19h00, ĉambro 705

La 7-a Azia Esperanto-Kongreso, aprile en Israelo estis prezentita de s-ro Sibayama Zyun'iti, kaj la 98-a Universala Kongreso, julie en Islando estis prezentita de s-ro Doi Hirokaz. Por la UK, s-ro Doi disdonis broŝurojn pri la lando japanlingve verkita, al la kunsidantoj. La broŝuroj estis donaco de la en-japana islanda ambasadorejo.

## NIAJ PLANOJ

### HAMA-RONDAJ VESPEROJ

\*la 16-a de marto, 17h00-19h00, ĉambro 708

Nia rondo decidis, ke la anoj provos ekzameni sin en la KER-ekzamenoj, kaj faros provon pri tio en tiu ĉi okazo. La ekzameno mem okazos junie en Tokio.

\*la 20-a de aprilo, 17h00-19h00, ĉambro 404

Nia Hama-Rondo (Jokohama Esperanto-Rondo) fariĝas 45-jaraĝa. Historio de la rondo estos revuita.

### ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

\*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de “Tra dezerto kaj praarbaro”, Klaso por legado de “Vivo de Lanti” / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

\*Regula Klaso en merkredo por legado de “Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj”.

### TIU ĈI GAZETO LEGERE BLAS RETE

Nia retejo komencis publikigi tiun ĉi gazeton “Novajoj Tamtamas” en <http://hamarondo.jimdo.com/novajhoj-tamtamas/>.


La numeroj de la jaro 2011 estas arkivigitaj.

Miyazaki Hideko (maldekstre) prezidis la prelegon de Doi Ĉieko (dekstre) en la Forumo.



- Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

## BELETRO



## Monologo de la hundido Gon

HIROSE Kanae

(3)

Un posttagmezon mia mastrino rompis mian sieston kaj fiksas promensnuron al mia kolringo. Ĉu jam? Okule mi demandis, ĉar ĝenerale ni promenas matene kaj vespere. “Jes, ni iru laŭ nova vojo”. Ŝi respondis klare. Ni ekpaŝis suden. Mi ne estis certa, ĉu ankaŭ en la direkto troviĝas parko. Ĉiokaze promeniri sur nekonata vojo signifas al mi plivastigi mian teritorion per mia urin-odoro. Ne grimacu, tio estas nia kutimo. Mi do iris serĉante taŭgajn lokojn por mia sfero.

“Rapidu! Hej, ek!”, subite sur min falis la krio de la mastrino. Samtempe ŝi ekkuris, ankaŭ miaj kruroj aŭtomate ektrotis. Mi maltrankviliĝis, ĉar ŝi ne diris, kien kaj por kio ŝi rapidas, sed mia trotado sekvis ŝin akurate. Tio estas la rezulto de ŝia trejnado al mi dumjara. Baldaŭ mi sentis aĉan odoron, kiun mi flaris en la azilo, kie nejunaj hundoj trenite de kitela viro malaperis kaj restis nur la odoraĉo. Mi bremsis min. “Marŝu antaŭen, aŭ vi suferos de moskitoj!”, mia mastrino trenis min. Moskitoj? La eta!, hum bagatele. Spite al mi, ŝi rapidigis min. Ni trapasis enirejon de la Dombesta Klinikoj kaj jam en la akceptejo. Mi ne volis veni ĉi tien. Jen, laodoro abomena. Mi devis nepre fuĝi el tiu ĉi kliniko. Haste mi turnis min al elirpordo. Mi ĝin puŝis kaj per la nazo kaj per la piedo, sed ĝi ne moviĝis. Tie sur la planko mi fiksas miajn plandojn, kaj la korpoflankon perforte alpremis al muro por ne plu movi min. Inter mi kaj la mastrino la promensnuro streĉiĝis, tiel ke la kolringo enmordus mian nukon. Tiam el interna pordo blank-kitela viro aperis kaj direktis al mi sian rideton certe cinikan.

Mi rememoris vortojn de la anatomo, kiu estis amikino de mia mastrino. Iam mi subaŭskultis babiladon de la du virinoj. La anatomo diris: “Ni havas pezan laboron, fizike ankaŭ anime. Elirante el kuracejo ni devas danksaluti pro tiu peza pakaĵo. Ene kuŝas ofte kvin hundokapoj. Ni ne devas havi kompaton al la hundoj. Ili

estas tre pezaj”.

Kulminis mia timo, ĉu malantaŭ la interna pordo embuskas kontraŭ mi io terura. Pro mia rezistado mia mastrino konfuzite murmuris al la blankvesta viro. “Malgraŭ la aspekto mia hundo estas timema kaj senkuraĝa. Ĝi loĝas ĉe mi jam unu jaron, sed de la komenco ĝi estas tia”. Miaj piedoj rigidiĝis pro teruro. Ŝi ignoris min kaj perforte tiris la promensnuron. Mi ekglitis sur la planko same kiel ŝtonstatua sledo, kaj en senŝanĝa figuro englitis en la kurac-ĉambron. Apenaŭ miaj piedoj eniris en la ĉambron la pordo aŭtomate fermiĝis kun brueto. En la rektangula kaj malvarmeta ĉambro, meze staris alta tablo, sur kiu sidis granda pesilo. Mia decido estis firma, ke iamaniere mi forkuru. Mi provis froti per la antaŭa piedpinto fendeton inter la pordo kaj muro, kaj por plie esplori mi ĉirkaŭflaris la plankon. Sed nenio min helpis. Subite miaj kruroj estis kaptitaj de du viroj. Mi perdis ekvilibron. “Helpon!”, mi kriegis, sed vane, mia mastrino ne rimarkis mian voĉon tute raŭkiĝintan.

(4)

En la sekva momento la viroj levis min kaj metis sur la pesilon. “28 kilogramoj”, indiferenta voĉo apenaŭ finiĝis, mia kolo estis forte ĉirkaŭpremita per manoj. Konsternite mi denove kriis “Helpon!”, sed ankaŭ ĉi-foje mia voĉo ne atingis mian mastrinon. “Sinjorino, tenu ĝian kokson ambaŭmane, por ke ĝi ne moviĝu”, diris la blank-kitela viro preparante injektilon. Mi anhelis, mia lango soifis. San... sango! La injektilo eksuĉis ruĝan likvaĵon el mia dekstra kruro. Ĉesu, mi petegas! Refoje io pikis al mi la kruron kaj poste ŝultron. Mi estis tute paralizita. Post sekundoj la manoj min ĉirkaŭpremantaj malstreĉiĝis. La viroj remetis min sur la plankon.

“Kia hundaĉo vi estas! Viaj timigitaj okuloj estis ruĝe kongestitaj. Estu kuraĝa! Laŭ via figuro oni vidas, ke en via sango estus miksitaj tiu de brava ŝafhundo, ĉu ne?”, mia

mastrino riproĉis min elirinte el la kliniko. Mi suprenrigardis kaj rimarkis, ke ŝiaj okuloj konsolas min kun plena kompatemo.

Revenvoje mi opiniis, ke inter ni mankis komunikado. Se antaŭ la ekiro al la kliniko ŝi sciigus min pri la vakcinado kontraŭ filario kaj la sang-esploro, mi estus povinta neniel terurigi. Mi komprenas ĉion, kion homoj parolas, sed ili antaŭjuĝas, ke hundoj ne kapablas kompreni homan lingvon.

Hodiaŭ mi rememoris multajn aferojn, sed nun jam ne venas al mi pliaj rakontindaj. Por distriĝi, mi ofte televidas. De sur la teraso tra la vitra glitpordo mi enrigardas la familian ĉambron kie staras televidilo. Mi interesiĝas precipe pri historio, ĉar mi deziras kompreni diversajn travivaĵojn de homoj, por ke mi estu preta vivi kun homoj harmonie.

Antaŭ nelonge, sur la ekrano mi vidis milojn

da homoj pelate marŝantaj en koncentrejon, kaj en la sama programero centojn da kranioj de homoj amase stakigitaj. Komentisto klarigis, ke okazis pogromo kontraŭ judoj, kaj la alia bildo montras sekvon de enlanda batalo. La kranioj estas cindroj de la viktimoj. La televido instruas min ne nur pri tragikaj eventoj en la mondo sed ankaŭ pri diversaj aferoj.

Milda vesperruĝo. Jam estas tempo promeni. Hodiaŭ ni promenos triope, mia mastrino, la filineto kaj mi. Kutime la filineto tenas mian promenŝnuron. Survoje mi snufas foliojn, dume miaj akompanantoj babiladas, fojfoje forgesinte min, la ĉefrolulon de la promonado. Kia trankvilo! Mi ne povas kredi, ke iam okazis mondmilitoj, kaj eĉ nun en iuj partoj de la mondo estas bataloj enlandaj, interlandaj.

Koran dankon pro via aŭskultado pri miaj rememoroj en infanaj tagoj! *(fino)*

---

---

## ESEJOJ

---

---



### Kien veturos Abe-maru?

KOYAMA Takesi

Kien veturos Abe-maru, kiu estas la ŝipo de la ĉefministro Abe Ŝinzoo?

Antaŭ 6 jaroj lia ŝipo veturis al “Bela lando”, tamen ĝi marrompiĝis survoje kaj la ŝipestro Abe demisiis pro malsano. Post 5 jaroj en la lasta decembro li denove iĝis la ĉefministro, kaj ĉi-foje li ekveturis celante al “Forta lando”.

Kial li ŝanĝis la direkton al “Forta lando” de “Bela lando”? Ĉar li volis montri sian potencon al popolo kiel la heredanto de famaj parencoj, mi supozas.

La patrinflanka avo de Abe Ŝinzoo estas Kiŝi Nobusuke, kiu estis la 56-a, 57-a ĉefministro de Japanio (1957~1960), kaj Satoo Eisaku, kiu estis la plijuna frato de Kiŝi, estis la 61-a, 62-a, 63-a ĉefministro (1964~1972). Tial Abe deziris ke ankaŭ li fariĝu forta ĉefministro kiel la grandaj avoj, kiuj intencis reviviĝon de la malnova konstitucio kun la politiko de riĉa regno kaj forta armeo. Ambaŭ fratoj plenumis taskon kiel vasaloj sub la Granda Japana Imperia Konstitucio dum la Pacifika Milito (1941~1945).

Konstitucio-reviziistoj diras, ke la nuna japana konstitucio estis altrudita de Usono en

la okupita periodo, kaj ke la konstitucio kun la rezigno de milito estas bagatela kaj sensignifa en la mondo havanta multe da konfliktoj. Japaniano devas havi memfaritan konstitucion por gardi sian landon kontraŭ malamikoj. Tial Japanio devas havi pli fortan armeon por ne malvenki.

Demokratio kaj paco de Japana konstitucio komencis fariĝi de usona gvido, tamen kelkaj japanoj, kiuj tiam jam havis demokratian kaj egalrajtan ideojn kontraŭ la japana imperiismo, partoprenis en komisiono por ellabori novan konstitucion. La komisiitoj, kiuj travivis tre mizeregan mondmiliton, enmetis la deziron de absoluta paco estonta. Tial la japana konstitucio enhavis tre subliman celon por realigi sendiskriminacian kaj pacan landon.

En forta lando oni devas prepari armadon pli kaj pli grandan por hipoteza malamika lando kaj la armada konkurso kaŭzas nur mizeregaĵojn por popolo. En konfliktaj zonoj nur “morto-komercistoj” gajnis/as/os profiton, mi pensas.

Nun la registaro klopodas por rekonstruo de la tertrem-cunama katastrofo kaj la akcidento de

nuklea centralo, sed ĝi ne iras glate. Do antaŭ diskuto pri forta lando la registaro devas establi novan urbon kaj vilaĝon por la loĝantoj, ĉar ili estis rabitaj je domoj, laborejo kaj agraro, kaj ne revenos en la forpelitaj loĝlokoj ĉirkaŭ kelkdek jarojn aŭ kelkcent jarojn.

Kvankam Abe-maru jam veturis ricevante grandan aplaŭdon al forta lando, ni devas

kontraŭi konstitucian revizion, kiu rigardas najbaron kiel malamikon, kaj ni devas ne forgesi danĝeron de la radioaktiva polucio ĝis la nukleaj centraloj tute nuliĝos el Japanio, mi opinias.

(noto: “-maru” estas japana maniero nomi ŝipon.)

## JAPANISME POR LA RUSOJ (4) notita de Anatolo Gonĉarov



En la libro: tr., Postmilita Japana Antologio, Osaka, 1988.

“Ĉu vi volas preni de mi la palton?” mi kriis, fiksante la kapon ŝanceliĝantan. Mi intencis krii, sed **lamis la lango** pro ebrio. p. 22, (tr., SAKAMOTO Syozi) [la rusoj: *la lango ebrie plektomoviĝis*]

Lia korpo eligis ĉe ĉiu moviĝo ian humide akran odoron de ledο kaj sentigis la ekziston de **muskoloj trempitaj en teda animo**... p. 37, (tr., MORITA Akira)

Sed li neniel reagis, restis **pasiva kiel kastrita ĉevalo**. p. 47, (tr., MORITA Akira)

knabino en la **aĝo de petolemo**, p. 49. (tr., KONISI Gaku)

Ĉe tiu penso mi saltlevis min sur la lito kiel la risorto de muskaptilo, tiel ke mi **preskaŭ forlasis la kapon sur la kapkuseno**. p. 145. (tr., KONISI Gaku)

La frapoj kreskis eĉ pli fortaj, kaj mi flaris ian tumultan atmosferon. “Kiu?” ĉi-foje mi volis voĉigi la vorton, sed la **voĉo ŝajnis eliri el la oreloj** anstataŭ el la buŝo. p. 146, (tr., KONISI Gaku)

“Via unueco min defendos, kaj samtempe defendos ankaŭ vin mem. Anstataŭigu la stultan kaj sensencan plimulton per la vera plimulto!”

Restis **problemo, kiu pendigos la sonorilon sur la ...** [evidente temas pri sur la **katon**, mankas apude la libro por la kontrolo, rim. de AG], p. 170. (tr., MORITA Akira)

Siatempe en la urbo troviĝis viroj diboĉemaj kaj kontraŭleĝaj, **elŝoviĝintaj el la feŭdismo**. Ili sin vestis per pompaj sed nenormalaj kaj liberaj kostumoj. MAEDA Ŝigeki, or., Oomoto, 1992, p. 49.

Kiam mi piediris surstrate en Pusan, post la vizito al tombejo de Uno-Militistoj, kun la ĉiĉeronino **ambaŭ kvazaŭ ŝultro**, ŝi surprize alparolis al mi korea-lingve. [Estas sola okazo ĉi-publikaĵe, kiam mi ne ĝis la fino komprenis la japanan esprimon, ĉu eble ŝulto-ĉe-ŝultre?]

Sakashita Masaaki, or., La Espero el Koreio, 1992, 4, p. 18.

“Vi plukas florojn”. Ĉe mia respondo ŝi **ridis en mallaŭta voĉo**, kaj diris...

UEYAMA Masao, tr., *Riveroj*, 1993, 1, p. 16.

(daŭrigota)



### Pri la muziknoto de “Rekviemo”

En la presita februara n-ro de tiu ĉi “Novaĵoj Tamtamas” aperis la muziknoto de “Rekviemo”, kun kelka fuŝo.

La ĝusta muziknoto estas trovebla en <http://hamarondo.jimdo.com/novajhoj-tamtamas/>.

Pardonon pro la eraro. (Sibayama Zyun'iti, la Redaktoro)